Joseph Düpjohann,

La vojkruco

tradukita de Manfredo Ratislavo

Se renkontas vi voj-krucon,
vi ekhaltu, preĝu vi;
ĉiu strat' en via vivo
venas sole ja de Di'.

Kruc' dum via vivo-vojo
ofte ege premas vin;
kaj ĝemante ĝin portante
multaj ne eltenas ĝin.

Same kiel Li la dornan
kronon portis kun sufer',
prenu vian krucon vi sur
via vojo sur la Ter'.

Vojo-krucoj estas signoj,
starigitaj por honor'
de ĉi tiu, kiu estas
de la mondo la Sinjor'.

Tial antaŭ vojo-kruco
manojn interplektu vi;
preĝu, ke benitan finon
grace donu al vi Di'.

...

Traduko de la Basgermana poemo "Dat Wiägekrüüs" de Joseph Düpjohann *(Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1930-10-18) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-272-551 (2005-01-17 13:54:37)